**ILEI-se** **Org.nr 802433-0501**

*Svenska Esperantolärares förening*

# *Agadraporto 2007*

*La estraro dum 2007:*

*Ordinaraj. Siv Burell, sekciestro*
*Kaisa Hansen, sekretario ĝis 19 majo*
*Bo Hedberg, sekretario ek de 19 majo*
*Bo Hedbergl, kasisto ĝis 19 majo*
*Siv Sjögren, kasisto ek de 19 majo*
*Inga Johansson*
*Fredrik Olofsson*
*Anstataŭantoj: Siv Sjögren ĝis 19 majo*
*Ragnhild Berglund ek de 19 majo*
*Margareta Andersson ĝis 19 majo*
*Ralf Jalming ek de 19 majo*

*Revizoroj:Anita Dagmarsdotter*
*Bo Sandelin ĝis 19 majo*
*Britta Rehm ek de 19 majo*
*Anstataŭanto: Ann-Louise Åkerlund*

*ILEI-se havis* ***44 membrojn dum 2007***
*La* ***jarkunsido*** *okazis,la 19an de majo en Lesjöfors. La kontaktoj inter la estraranoj ĉefe estis interretaj kaj pro tio ni nur havis unu protokolitan kunvenon, la 9an de julio..*

*La 6an de oktobro lige al la jarkunveno de SEI, ILEI-se havis kunsidon kun SEI por diskuti kiel kunlaboru. Por kunordigi nian eksteran informon, SEI kaj ILEI-se elektis Kaisa Hansen kiel kunordiganton. Ni esperas ke ankaŭ aliaj E-organizoj uzu la servojn de Kaisa.*

***Hejmpaĝo****: adreso: http://ilei.info/svedio/*
*Andreas Nordström bone prizorgas la teknikaĵojn.*

***Raporto pri esperantokursoj:***

- *en la gimnazio de Lerum*
- *en la universitato de Stokholmo, 20 poentoj*

***Studrondoj, pri kiuj ni informiĝis :***
*en Stokholmo, Gotenburgo, Malmö, Helsingborg, Härnösand, Örebro, Karlstad*

***Ekzamenpreparaj seminarioj printempe***

- *en Stockholm kaj Gotenburgo*
- *En Stokholmo ankaŭ okazis prelegoj, publike malfermataj*

# Verksamhetsberättelse 2007

*Styrelsen under 2007:*

Ordinarie. Siv Burell, ordförande
Kaisa Hansen, sekreterare till 19 maj
Bo Hedberg, sekreterare från 19 maj
Bo Hedberg, kassör till 19 maj
Siv Sjögren, kassör från 19 maj
Inga Johansson
Fredrik Olofsson
Suppleanter: Siv Sjögren till 19 maj
Ragnhild Berglund från 19 maj
Margareta Andersson till 19 maj
Ralf Jalming från 19 maj

Revisorer: Anita Dagmarsdotter
Bo Sandelin till 19 maj
Britta Rehm från 19 maj
Suppleant: Ann-Louise Åkerlund

ILEI-se har haft **44 medlemmar under 2007**
**Årsmötet** ägde rum 19 maj i Lesjöfors. Kontakterna mellan styrelseledamöterna skedde mest på nätet och därför har vi bara haft ett protokollfört möte. den 9 juli..

Den 6 oktober, i anslutning till SEI:s årsmöte, hade ILEI-se ett möte med SEI för att diskutera hur vi skulle samarbeta. För att samordna vår externa information, valde SEI och ILEI-se Kaisa Hansen som koordinator. Vi hoppas att också andra E-organisationer ska använda sig av Kaisas service.

**Hemsida**: adress: *http://ilei.info/svedio/*
Andreas Nordström gör ett bra jobb som tekniskt ansvarig.

**Rapport om esperantokurser:**

- på gymnasiet i Lerum
- på Stockholms universitet, 20 poäng

**Studiecirklar, om vilka vi har kännedom:**
i Stockholm, Göteborg, Malmö, Helsingborg, Härnösand, Örebro, Karlstad.

**Examensförberedande seminarier under våren.**

- i Stockholm och Göteborg.
- I Stockholm fanns också föreläsningar, öppna för allmänheten.

| | |
|---|---|
| ***Intensaj kursoj:***<br>▪ *ILEI-se aranĝis tritagan intensan kurson en Mullsjö 3 – 5 aug. por 29 partoprenantoj (http://ilei.info/svedio/ ).*<br>▪ *Esperanto-Gården,Lesjöfors, ĉiun jaron aranĝas semajnan intensan kurson en junio.* | **Intensivkurser:**<br>▪ ILEI-se ordnade en tredagars intensivkurs i Mullsjö 3-5 aug för 29 deltagare *http://ilei.info/svedio/*<br>▪ Esperanto-Gården, Lesjöfors, ordnar varje år en intensivkursvecka i juni. |
| ***Ekzamenoj de ILEI/UEA en Esperanto-Gården,*** *Lesjöfors, 17-18 majo. Se oni volas aranĝi ILEI/UEA-ekzamenadon oni devas petskribi al IEK – Internacia Ekzamena Komisiono - pli ol tri monatojn antaŭ la ekzamendato. Unu el la IEK-estaranoj, Mireille Grosjean el Svisio, sendis blankedojn. Ŝi fariĝis la ĉefekzaminanto, sed ankoraŭ du estis bezonataj.*<br>*Agneta Emanuelsson ,Roland Linbdblom kaj Lars Forsman sendis siajn vivrakontojn al IEK. La estraranoj de IEK "voĉdonis" kaj ĉiuj tri estis aprobitaj (kompreneble!).*<br>*. Kiam preskaŭ estis la findato la sekretario Reza Torab, Irano kaj la prezidanto Probal Dasgupta, Hindio, devis akcepti retpoŝtajn petskribojn , ĉar la blankedoj, senditaj per ordinara poŝto, ne atingis la sekretarion en Irano.*<br><br>*Devas esti minimume tri kandidatoj sur la elementa nivelo kaj tri sur la meza. La unua listo enhavis 12 nomojn sed venis 10personoj kaj trapasis 9 (4 sur la elementa, kaj 5, sur la meza. La supera ankoraŭ ne troviĝas).Mireille Grosjean, Agneta Emanuelsson kaj Roland Lindblom prenis sur sin la dutagan ekzamenadtaskon.*<br>*Sen kunlaboro kaj ekonomia helpo de SEF, ILEI-se havus grandajn problemojn.* | **ILEI/UEA-examina på Esperanto-Gården,** Lesjöfors, 17-18 maj. Om man vill ordna en ILEI/UEA-examination, måste man ansöka hos IEK – Internationella Examenskommissionen – mer än tre månader före examensdatum. En av ledamöterna i IEK, Mireille Grosjean från Schweiz, skickade blanketter. Hon blev huvudexaminatör, men ytterligare två behövdes. Agneta Emanuelsson, Roland Lindblom och Lars Forsman skickade sina levnads-beskrivningar till IEK . styrelseledamöterna i IEK " röstade" och alla tre blev godkända (naturligtvis!). När det nästan var slutdatum blev sekreteraren Reza Torabi, Iran och ordföranden Probal Dasgupta, Indien, tvungna att acceptera ansökan via mail, för blanketterna, som skickats med vanlig post, nådde inte sekreteraren i Iran.<br><br>Det måste var minst tre kandidater på elementa-nivån och minst tre på meza.. Den första listan innehöll 12 namn men det kom 10 personer och nio genomförde examen (4 på elementa och fem på meza-nivån. Supera- nivån finns ännu inte). Mireille Grosjean, Agneta Emauelsson och Roland Lindblom åtog sig uppgiften att examinera under två dagar..<br>Utan samarbete och ekonomisk hjälp av SEF, skulle ILEI-se ha haft stora problem. |
| ***La jarkonsido de ILEI okazis en Ranzan, Japanio****. ILEI-se rajtis sendi tri reprezentantojn. Ni elekits Willem Posthuma, Gunnar Olsson kaj Roland Lindblom. Willem kaj Gunnar iris kaj ricevis la voĉon de Roland, en okazo de voĉdono. La raporto de Willem – kun bildoj – estas legebla sur nia hejmpaĝo http://ilei.info/svedio/ .* | **ILEI´s årsmöte ägde rum i Ranzan, Japan**. ILEI-se hade rätt att sända tre representanter. Vi valde Willem Posthuma, Gunnar Olsson och Roland Lindblom. Willem och Gunnar åkte och "fick Rolands röst" i händelse av en omröstning. Willems rapport – med bilder – kan läsas på vår hemsida http://ilei.info/svedio/ |
| ***Partopreno en la Instruista Kursaro en Poznan, Pollando.***<br>*SEF kaj ILEI-se kunlaboris kaj sendis Carl Mäsak al Instruista Kursaro. Temas pri studoj aranĝitaj de ILEI kaj la Universitato Adam Mickiewicz, Poznan 15 -21septembro 2007, 2-8 februaro 2008 kaj intertempa hejmalaboro, reta konsultiĝo kun la kursgvidantoj kaj pretigo de* | **Deltagande i Lärarkurserna i Poznan, Polen**<br><br>SEF och ILEI-se samarbetade och skickade Carl Mäsak till Instruista Kursaro Det rör sig om studier anordnade av ILEI och Adam Mickiewicz-universitetet i Poznan 15 – 21 september 2007, 2-8 februari 2008 och hemarbete i mellanperioden, nätkonsultation med kursledarna och färdigställande av ett arbete om ett metodiskt ämne, som skall |

| | |
|---|---|
| *verkaĵo pri metodika temo prezentota ĉe la fina ekzameno en septembro 2008. La unua raporto de Carl Mäsak al ILEI-se jam venis.*<br>*La kurso ŝajnas altnivela.* | presenteras vid slutexamen i september 2008. Carl Mäsaks första rapport har redan kommit till ILEI-se. Kursen verkar ha hög kvalité. |
| ***Tri membroj de ILEI-se aranĝis ekspozicion sur la placo de Lövgärdet, Gotenburgo, la 15an de septembro.***<br>*Malgraŭ la blovego sufiĉe multaj personoj ricevis informon pri Esperanto (-"Esperanto neniam antaŭe havis tiom grandan disvastiĝon en Lövgärdet", diris viro, kiu helpis nin kolekti broŝurojn, kiujn la blovego disiĝis.).* | **Tre medlemmar från ILEI-se arrangerade en utställning på Lövgärdets torg, Göteborg, 15 september.**<br>Trots stark blåst fick ganska många personer information om esperanto.*(-"Esperanto har aldrig tidigare haft en så stor spridning i Lövgärdet",* sa mannen som hjälpte oss att samla ihop broschyrer, som vinden spritt) |
| ***La Eŭropa Lingvotago, 26 septembro.***<br>*Reprezentantoj de ILEI-se diversloke atentigis lernejojn pri tiu grava tago.*<br>*En Malmö Sten Svenonius gvidis tritagan kurson en sia popola altlernejo. En Gotenburgo membroj de ILEI-se vizitis du lernejojn, interparolis kun la rektoroj kaj lasis materialon al la lernejaj bibliotekoj. Kune kun la Esperantoklubo de Gotenburgo ni celebris la tagon en la Lingva Kafejo,* | **Europeiska Språkdagen, 26 september.**<br>Representanter för ILEI-se på olika platser uppmärksammade skolor om denna viktiga dag. I Malmö ledde Sten Svenonius en tredagarskurs på sin folkhögskola. I Göteborg besökte medlemmar av ILEI-se två skolor, pratade med rektorerna och lämnade material till skolbiblioteken. Tillsammans med Göteborgs Esperantoklubb, firade vi dagen på Språkcaféet. |
| ***Ĉe Skolforum en Älvsjö, Stokholmo****, membroj de ILEI-se deĵoris. Lars Forsman donis lecionojn ĉiun horon. Entute estis sukcesa ekspozicio kun multaj vizitantoj al la esperantobudo.* | **På Skolforum i Älvsjö, Stockholm**, tjänstgjorde medlemmar i ILEI-se. Lars Forsman gav lektioner varje timme. Sammanfattningsvis var det en framgångsrik utställning med många besökare till esperantoståndet |
| ***Direktivoj por la laboro de ILEI-se, kiuj estis prezentitaj dum la pasinta jarkunsido***<br>*Ĉefe ni faris tion, kion ni prenis sur nin, sed la kontaktoj kun la membroj ne estis tiom oftaj kiom ni ŝatus. Kelkaj jmembroj atentigis nin pri la manko de informmaterialo.*<br>*ILEI-se skribis al "Framtidens Kultur"petante 27 000:- por produkti materialon kaj trejni instruistojn. Bedaŭrinde la respondo estis NE.* | **Riktlinjer för ILEI-se's arbete, som presenterades under förra årsmötet.**<br>Huvudsakligen genomförde vi vad vi åtagit oss, men kontakterna med medlemmarna var inte så ofta förekommande som vi hade önskat.Några medlemmar uppmärksammade oss på bristen på informationsmaterial.<br>ILEI-se ansökte hos Framtidens Kultur om 27 000:- för att framställa material och utbilda lärare. Tyvärr var svaret NEJ. |
| *Resume 2007 estis laborplena kaj fruktodona jaro.* | Sammanfattningsvis var 2007 ett arbetsfyllt och givande år. |
| *Nome de la estraro de ILEI-se*<br>Siv Burell, sekciestro | För styrelsen i ILEI-se<br>Siv Burell, ordförande |